

Fonta komentario

Ĉiuj detaloj de la invado resp. konkerado originas el antikvaj fontoj, faritaj de antikvaj aŭtoroj kaj historiistoj. Ili apogas sin sur eminentuloj kaj sur ĝenerala sciado. Sole Cezaro raportas sian propran agadon. Tacito reliefigas Agrikolon, ĉar tiu estis lia bopatro. Kiel sincera historiisto li garantias objektivan sciigon sen iaj emocioj favore al tiu. La precizaj fontindikoj estas jenaj, kun citaĵoj enkrampigitaj:

- 1) G. Julius Caesar. *De Bello Gallico* (libro IV ĉapitro 20 etc., libro V. ĉap. 8/23)*
- 2) Cassius Dio: *Historio de Romo* (libro LX, ĉapitro 19/22*)
- 3) P. Cornelius Tacitus: *Annales* (libro XII, ĉap. 31/40, libro XIV, ĉap. 29/39)*
- 4) P. Cornelius Tacitus: *De vita Iulii Agricolaë liber*.*

Literaturo

Priliteraturaj indikoj

Krom tiuj supre cititaj aŭtoroj, modernaj historiistoj neglektas la eventon, verŝajne negravan por ili, kvankam estas dubinda, ĉu la nunaj enloĝantoj de Britujo malaprobas ian ajn sciadon pri tiu antikva epoko. Certe ili ne estas la idoj de la keltaj britoj, eble almenaŭ malgrandparte. Do, nur skize ili – jene listigitaj – mencias la romian okupperiodon. Eĉ von Ranke nur per kelkaj linioj traktas tian periodon laŭ sia duvoluma historio de Britujo. Tial ĉiuj literaturaj, tie ĉi indikitaj, enhavas sole proksimumajn kontribuojn uzeblajn. Ĉiuj literaturaj estas verkitaj germanlingve, escepte tiu de Tacitus, kiu estas kaj latine originala kaj germanlingve tradukita. Ĝi estas kolekto de antikvaj fontoj kaj pro tio komplete uzebla. (* = Eldonjaro kaj eldonejo ne plu determineblaj pro pruntepreno el biblioteko antaŭ ses jaroj.)

Literatura listo

- P. Hars, La darejko. Sortoj ĉirkaŭ ora monero (*Der Dareikos. Schicksale um eine Goldmünze*) 5a novelo: Junulo ĉe la gvardio de Julius Caesar (*Ein junger Mann bei der Leibgarde J. Caesars*). Theiss, Stuttgart, 1992 (347p.)
- Historia Mundi*, 4a vol: La Romia Imperio kaj la kristaneco (*Römisches Weltreich und Christentum*). Francke, Bern, 1956 (611p.)
- (dtv)-Leksikono de la antikva historio, trivoluma (*dtv-Lexikon der Antike, Geschichte*). dtv, 1978 (290, 312, 307p.)
- Meyer Poŝleksikono pri historio, sesvoluma (*Meyers Taschenlexikon, Geschichte. Bibl.Inst. Mannheim/Wien/Zürich, 1982 (po 320p.)*)
- Leopold von Ranke, Majstroverkoj. Angla historio duvoluma, 1-a vol. (*Meisterwerke: Englische Geschichte, Bd.1*)*
- W. Seyfarth, Romia historio: La imperiestra epoko, duvoluma 1-a vol. (*Römische Geschichte, Kaiserzeit 1*). Wissensch. Buchgesellsch., Darmstadt, 1974 (329p.)
- Tacitus: La romianoj en Anglujo (*Tacitus: Die Römer in England*)*
- O. Veh: Leksikono de la Romiaj Imperiestroj (*Lexikon der römischen Kaiser*). Artemis, Zürich/München, 1990 (158p.)
- M. Waltari: Minutus la romiano (*Minutus der Römer*). Weltbild, Augsburg, 1995 (714p.)

Adreso de la aŭtoro

Gerhard KALKHOF <gerh.kalkhof.ltb@t-online.de>
An der Ritsch 17
DE – 36341 – Lauterbach / GERMANIO

Priaŭtoro informo

Emerita instruisto; speciala fako kaj ŝatokupo: historio.

La ago de la luda funkciado de parolkapablo en planita lingvo

Constantin DOMINTE

Enkonduko

En la bildon, kiun donis al la funkcioj de la parolkapablo Jakobson (1958) ne inkluzivis ankaŭ la ludan funkcion. Okazo por Mounin (1972), kiu konstatis la mankon, demandi sin ĉu la usona lingvisto ne integris reciproke la ludecon kaj la poeziecon. Komprenoble, inter la ludeco kaj la poezieco estas komunaj punktoj: la poezieco estas konsiderebla kiel alta speco de ludeco.

Jakobson difinis la poezian funkciadon de la parolkapablo, tiun funkciadon orientiganta al la mesaĝo, kun estetika efiko, per la „projekciado de la principo pri la ekvivalenteco disde la akso de la elektado (inter variaj lingvaj elementoj „stokitaj“ en la cerbo) sur la akson de la kombinaĵoj (de lingvaj elementoj)“. Sed ankaŭ la ludan funkciadon de la parolkapablo oni povus difini per la sama principo, kun du gravaj diferencoj kompare al la poezia funkciado, kaj nome:

1) dum la ago de la poezia funkciado kondukas al la realigo de agrabela mesaĝo, plaĉa al la aŭskultanto, ĝiaj rimedoj de realigo, belsonecaj, estante la ritmo, la vortordo, la fonetikaj stilfiguroj (alidire: sonfiguroj), elinter kiuj elstaras la aliteracio kaj la rimo, anstataŭe, la ago de la luda funkciado kondukas al la realigo de amuza, eĉ ridiga mesaĝo, destinita malstreĉi la atenton de la aŭskultanto, mesaĝo havanta kelkfoje eŭfemismajn potencojn, destinitaj protekti la konvenecojn en delikataj cirkonstancoj, la rimedoj de la realigo de tiu ĉi lasta estante, ĉefe, la variaj specoj de vortludoj;


2) dum la aliteracihavaj kaj rimhavaj vortoj estas projekciataj, per la ago de la poezia funkciado, je iu „distanco“ iuj rilate la aliajn sur la akson de la kombinaĵoj, anstataŭe, la samaj vortoj, aŭ aliaj, estas projekciataj, per la ago de la luda funkciado, kelkfoje preskaŭ en unu saman punkton, malpli ofte eĉ en unu saman punkton sur la akson de la kombinaĵoj.

De Saussure (1916) atentigis, ke, dum la parolkomunikado, oni ne povas elparoli samtempe du diferencajn elementojn apartenantajn al la lingva sistemo, sed nur - ĉu unu, ĉu alian - elinter ili. Sendube, la svisa lingvisto pravis, se oni konsideras la formalan lingvan komunikadon en iu ajn ĝenerale kulturita lingvo (angle: *standard language*). Sed tuj kiam oni transpasas la limojn de tia lingvoaspekto, nome en la neformalan, nekonvenciecan parolkomunikadon, tiam fariĝas ebla la supermetado, almenaŭ parta, sur la akso de la (vort)kombinaĵoj, de po du diferencaj elementoj de la sistemo, elektitaj el asociiga serio de sencohavaj lingvoelementoj.


Sen esti pritraktinta la problemon en tiuj ĉi terminoj kaj sen esti rilatinta la ludan funkciadon de la parolkapablo kiel tia, konkludajn ekzemplojn de tia parola manifestiĝo liveris la dana romanisto Nyrop (1913) pri la franca kaj aliaj okcidentaj romanaj lingvoj, Jordan (1944) kaj precipe Graur (1949) pri la rumana lingvo. Nyrop nomis franclingve tiajn fenomenojn *substitutions* (anstataŭigoj, substituoj) kaj Graur, rumanlingve, iom metafore, „*deraieri*“ *lexicale* (leksikaj „elreliĝoj“).

Sed ni vidu unue kiel oni povas skemisme reprezenti parton de la melĥanikismo propra al la ago de la poezia funkciado de la parolkapablo, konsiderante la aliteracion kaj la timojn (en la ĉisuba skemo, π = akso de la mensaj asociigaj paradigmaj rilatoj inter la parolelementoj aŭ akso de la elektado, dum σ = akso de la kombinaj rilatoj [sintagmaj] inter la samaj elementoj):

Aliteracio:



Rimoj:



Sekve, la aliteraciĥavaj vortoj sin sekvas senpere unu la alian en sama verso, sen „supermetiĝi“ unu super la alian, kaj la rimhavaj vortoj sin sekvas iom distance unu disde la alia, plej ofte en apartaj versoj, kio ankoraŭ pli evidente malhelpas ian reciprokajn „supermetiĝojn“.


Sed en la ŝerca franclingva esprimo, komentita de Nyrop, *belge comme une oie*, laŭvorte: „belga kiel ansero“, la vorto *belge* anstataŭas (aŭ, konforme al la esprimo de la dana lingvisto: estas substituanta al) la antaŭe uzita *bête*, t.e. stulta. La Nyrop-koncepta „substituto“ supozigas, laŭ tio, kion oni povas vidi en tiu ĉi ekzemplo kaj en multaj aliaj okupantaj naŭ preskaŭ plenajn paĝojn en la libro de la aŭtoro, la „gardadon“ de la fonetika komenco komuna al la substituanto kaj al la substituato; kp. ankaŭ la hispanan *vamos a la comedia* „ni iru al la komedio“ anstataŭ *vamos a comer* „ni iru manĝi“. Ekzemplo koncernanta la rumanan lingvon, komentita de Graur kiel leksika „elreliĝo“, estas la ŝerca popola esprimo, atestata en la verkaro de la granda prozverkisto kaj rakontisto Ion Creanga, nome: *Dumnezeu sa-l iepure!* „Dio lin... leporo!“ anstataŭ *Dumnezeu sa-l ierte!* „Dio lin pardonu/malkulpigu!“

Tiaj ekzemploj evidentigas aliteraciajn „substitutojn“. Sen pritrakti la aferon en tiaj terminoj, alian leksikan „elreliĝon“ citis Bociort 1995, p. 350 : rumana *pui de lele* „putinidoj“ anstataŭ *pui de lei* „leonidoj (figursence, t.e. herooj)“, titolo de relative fama poeziaĵo el la jaro 1891.


Pri la „substituo“ pere de la rimo atentigis la rumana lingvisto *Cazacu* (1944), montrante, ke iu nedeca esprimo, kia la rumana *hai sictir!* „for de tie ĉi!“ (enhavante turkdevenan obscenan verbon), fariĝas eŭfemisma ĉe iuj parolantoj de la rumana, sub la formo de la kunrima esprimo *hai ŝecspir!* (aludanta la nomon de Ŝekspiro) kaj kun la sama senco, kiel la origina esprimo. Tiukaze la substituanto gardas la fonetikan finon komunan kun tiu de la substituato.

Tiaj ekzemploj demonstras, ke en la ŝerca parolmaniero kaj kelkfoje en tiu eŭfemisma okazas la parta „supermetiĝo“ de du apartaj elementoj de la sistemo:

Aliteracio:




Rimo:



Tamen, kelkfoje eblas eĉ la kompleta „supermetiĝo“ de du anoj de unu sama mense asociiga serio, nome en la okazo de la homonimoj, kiel en la rumanlingva ŝerca esprimo „*seamăună, dar nu răsare...*“, uzanta la homonimecon de la verboj *a semăna* (l. „simili, esti simila

Homonimeco:



al “) kaj *a semăna* (2. „semi“, kun la proksimuma senco „li aŭ ŝi ... semas, sed nenio ĝermas...“), uzata por rilati similecon neperfektan inter du aĵoj, du estaĵoj kaj precipe du personoj. Tiu esprimo estas ja ĝenerala en la rumana popola parolmaniero.

Oni konstatis en la rumana ankaŭ aliajn tiajn kompletajn supermetiĝojn de du diferencaj, sed homonimaj vortoj en la ĝenerala ŝerca parolado, uzanta la ludan funkciadon de la parolkapablo.

Eblas pluraj specoj de substituo, parencaj al tiuj jam ekzemplitaj, nome:

- (1) la propre-dirita „**elreliĝo**“ (*Graur* 1949, nomita de *Nyrop* 1913 *substitution*) konsistanta el la gardado de komuna fonetika komenco de la vortoj engaĝitaj en tiu fenomeno;
- (2) la **substituo per la rimo** (*Cazacu* 1944, nomita de *Dominte* 2000) rumane *coliziune* [kolizio], konsistanta el la gardado de komuna fonetika fina parto de du vortoj; mi aldonu ekzemplon ĉerpitan el *Bociort*, cit.verk.: rumane: *studii și deșeuri* "studioj kaj restaĵaĉoj" anstataŭ *studii și eseuri* „studioj kaj eseoj“;
- (3) la **leksika „bufrado“**, konsistanta el la gardado de komunaj komenca kaj fina partoj de du leksemoj engaĝitaj en la substituo, ekz. la ŝerca vortkombino rumana *salată orizontală* „horizontala salato“ anstataŭ *salată orientală* „orientdevena salato“; alia ekzemplo, ĉerpita same el *Bociort*, cit.verk.: rum. *opere cumplite* „terurigaj verkoj“ anstataŭ *opere complete* „kompletaj verkoj“;
- (4) la **leksika „vagonaro“**, konsistanta el la gardado de komunaj komenca, fina kaj nur one meza(j) partoj de du vortoj, ekz. la ŝerca vortkombino rum. *lătrătură populară* „popola bojado“ anstataŭ *literatură populară* „popola literaturo“, registrita en la XIXa jarcento;
- (5) la „**karambolo**“ **leksika**, konsistanta el la gardado de la meza komuna parto de almenaŭ unu el la du leksemoj engaĝitaj en la substituo, ekz. rum. *Zbuciumul plămânilor* „Skuado de la pulmoj“, sarkasme ŝerca sintagmo anstataŭ *Bucegi*, nomo de tipo de fortaj, senfiltraj rumanaj cigaredoj;
- (6) la **kompleta aŭ homonimeca substituo**, konsistanta el la anstataŭigo de tutaj sonkompleksoj de la leksemoj engaĝitaj en la sama fenomeno, kiel en la rumana esprimo, jam citita, *seamăună, dar nu răsare...* aŭ en la rumanalingva vortludo pri la „kulmino de la radiofonio“, kiu tekstas: *să prinzi postul Paștelui pe unde poși* „pasigi la

paskofeston tie, kie eblas“, kun la homonimoj *post* 1 „fasto“ kaj *post* 2 „radioelsendo“, respektive *unde* 1 „(tie) kie“ kaj *unde* 2 „ondo“;

(7) la leksika „hibrido“, konsistanta el la arbitreca kunluigo de sonkompleksaĵoj aŭ de partoj de sonkompleksaĵoj de diferencaj vortoj, ekz.: rum. *telegrabcică* (menciita de la rumana lingvisto *Hristea* (1968), kiu ĉerpis ĝin el la verko de *Sadoveanu*, kie supermetiĝis *telegramă* „telegramo“ kaj *grabcică* „urĝ(ec)a“ – ĉiuj ĉi lastaj specoj, difinitaj kaj komentitaj de *Dominte*, jam cit.

Tiaj fonetikaj supermetiĝoj kaj vortkombinaĵoj, apogilo de la vortludeco, estas propraj al ĉiu ajn lingvo en plena agado de ĝiaj funkcioj, aŭ – en metaforaj terminoj, de longe enradikiĝintaj – al ĉiu „vivanta“ lingvo. Ni vidu nun, kiom „vivanta“ – en la samaj terminoj – oni povus konsideri planitan lingvon kia Esperanto.

Ĉu ankaŭ en ĝi eblas supermetiĝoj aŭ vortkombinaĵoj tiaj, kiajn oni menciis ĉi-supre, surbaze de franc-, hispan- kaj rumanlingva materialo, alidirite: ĉu ankaŭ en Esperanto eblas la ago de la luda funkcio de parolkapablo per tiaj rimedoj?

Bedaŭrinde, mi ne faris elĉerpan ĉi-koncernan esploron de ĉiuj esperantlingvaj tekstoj (ĉar okazon esplori la parolkapablon de nerumanaj esperantistoj mi tre malofte havas), sed la sekvantaj ekzemploj, ĉerpitaj el nur kelkaj legaĵoj, povus esti konsiderataj, por la momento, sufiĉaj cele al ia jesa respondo rilata la demandon supre vortumitan.

Mi do liveros ekzemplojn per esperantlingva materialo nur rilate la specojn de substituo nomitajn pli supre „bufrado“ (sub 3), homonim-ea supermetiĝo (sub 6) kaj leksika „hibrido“ (sub 7).

Ekzemplon de esperantlingva „bufrado“ mi ĉerpis el la recenzo de *Hector Alons i Font* pri la libro „Slango kaj ĵargono en Esperanto“ de *Wouter F. Pilger* (2000) (kp. „Esperanto“, UEA, XCIII, n-ro 1112, januaro 2000, p.14, III-a kol): „Salaton!“ anstataŭ „Saluton!“. Alian ekzemplon de bufrado liveras *Lins* (1990): temas pri la esperantlingva putrujo anstataŭ patrujo, en sarkasma teksto pri la intermilita jugoslavia administracio laŭ la opinio de serba esperantisto: "(kiu) amare plendis en 1926, ke en lia putrujo la ĝenerala diskriminacio kontraŭ laboristoj etendiĝas al ilia deziro lerni Esperanton".

Ekzemplojn de leksikaj „hibridoj“, uzitaj en la poezio, ofertis *Georgo E. Maŭra* (alie *Gaston Waringhien*) en la II-a strofo de sia „Lita

nio“ (1979) (kp. „Baza literatura krestomatio“, red. *Vilmos Benczik*, HEA, *Budapest*, 1979, p.137-139), kiun mi kopias tie ĉi:

„Sganelo kaj soldaĉo / miksamase en la kaĉo / kun ili *Verlaine*“
kaj en kiu „Sganelo“ rezultis per hibridigo inter „ganelo“ kaj Sganarelo (nomo de Moliera fikcia persono), kaj „soldaĉo“ rezultis el „soldato“, per la substituo de la malestimiga sufikso -aĉ- al la fragmento de sonkompleksaĵo -at-, asimilita al la sufikso de la prezenca pasiva participo.

Koncerne la kompletan (homoniman) leksikan supermetiĝon mi mencias la eksterordinarajn vortludajn atingiĝojn de *Raymond Schwartz* en lia fame konata poezia teksto „La diversaj aĝoj de l'homo“ (en „Esperanta Antologio. Poemoj 1887-1981“, red. *William Auld*, 2a eldono reviziita kaj kompletigita, UEA, *Rotterdam*, 1984, p.230-231) kiun mi same reproduktas ĉi-sube, tiun ĉi fojon preskaŭ integre:

„En supra ĉambro, lulo, lulo... / Anĝele dormas la etulo: / Etaĝo.
Sed baldaŭ li el dorm' sin ŝiras / Kaj pri la bela mondo miras: / Miraĝo.
Jam ne plu side li tamburas / Sed tra la dom' explore kuras: / Kuraĝo.
Kun vundoj li (kaj sen rubandoj) / Revenas el stratbubaj bandoj: / Bandaĝo.
Kaj baldaŭ sekvas li kun ĝojo / Knabinon ĉie sur la vojo: / Vojaĝo.
Al ŝi li donas sian nomon / Por fondi kune novan domon: / Domaĝo.
(... ..)“

La mallongaj amfibrakaj versoj aldonitaj al ĉiu jamba vers-paro unuavide enhavas la simplajn kaj banalajn substantivojn **etaĝo**, **kuraĝo**, **miraĝo**, **bandaĝo**, **vojaĝo** kaj **domaĝo**, sed – fakte – ili, aldone, ankaŭ alimaniere estas (sub)kompreneblaj; tiel la poezititolo kaj precipe la duaj rimvortoj de ĉiu vers-paro donas la ŝlosilon al tiu ĉi ambigua poezia teksto; per tio la jam cititaj vortoj fariĝas legeblaj kiel kunmetaĵoj: **et/aĝo** (kp. semantike *supra ĉambro* kaj morfologie precipe *et/ul/o*), **mir/aĝo** (kp. *mir/as*), **kur/aĝo** (kp. *kur/as*), **band/aĝo** (kp. semantike *rubandoj* kaj morfologie precipe *band/o/j*), **voj/aĝo** (kp. *voj/o*) kaj **dom/aĝo** (kp. *dom/o/n*). Aliloke, en prozaj tekstoj *Schwartz* substituas sintagmon (vortkombinaĵon) al simpla vorto, t.e. **litera turo** „turo de literoj“ al **literaturo**, aŭ inventitan de li „leksikan“ hibridon aludantan samtempe du diferencajn vortojn, t.e. **kanabino** substituanta al **kanabo** kaj **knabino** aŭ, fine, per la sugesto de la rimo, li humure „kompletigas“ la liston de la kaznomoj: *nominativo, genitivo, dativo, akuzativo* kaj *aperitivo*.

Tiaj tute apartaj strukturaj „analizoj“ kaj „interpretaĵoj“ de la ordinaraj elementoj en la leksika trezorejo de Esperanto aspektas kaj sonas kvazaŭ naturaj en la fluo de la versoj kaj prozaĵoj de *Schwartz*, kio voĉas pri lia talento de humura verkisto. Mi pretere aldonu aliajn ĉerpaĵojn el lia humurpoezia volumo „La stranga butikoj“ (1931) (Parizo) :

1) la „hibridojn“ **muzejoj**, el *muzoj* kaj *muzeo* (p.9), **tiktak-tiko**, el *tiktako* kaj *taktiko* (p.38), **barbharoj**, el *barbaroj* kaj, respektive, *barbo* kaj *haroj* (p. 39);

2) la homonimiajn vortludojn: **portret/o** kaj **port/ret/o**, **kokard/o** kaj **kok/ard/o**, **krim/ul/o** kaj **kri/mul/o**, **amput/o** kaj **am/put/o**, **sal/min/o** kaj **salm/in/o**, **kast/rit/o** kaj **kastr/it/o** (p.40-41), **balad/o** kaj **bal/ad/o**, kaj ĉiujn aliajn vortludojn ĉirkaŭ **balo** – kanibaloj, balistiko, **bal**-konoj (kun la streketo de la aŭtoro), **bala** ilo (kun la distancigo de la aŭtoro, en "Dancig-a Mondkongreso" (p.42-43), humura kvazaŭ respondaĵo al la *Kalocsay*-a serioza kaj solena aliteracia „Kongresa runo“ (*Helsinki*), jam citita; eraro de...**sin-takso** (p.46 k.a.), inter kiuj ne mankas:

3) provoj de dulingvaj substituo, kiaj la japanaj-esperantlingvaj, en la „Japana balado“ (p. 100-101) .

Bedaŭrinde, ne samtiel nature sonas la samspecaj aŭ almenaŭ parencaj vortludoj de *McGill* (1986) en lia „Streĉ’ eĉ’, Steĉj-skeĉ’!“, kie la abundo kaj la denseco de tiaj reinterpretadoj kun la preskaŭ plenaj paĝoj de malrektaj klarigoj kaj aŭtoraj sugestoj de deĉifrado riskas samtiom tedi la leganton kaj eĉ videbligas la fortostreĉon de la aŭtoro produkti ilin, kio donas la ĝeneralan impreson de artefariteco.

Iom proksimaj al la atingadoj de *Schwartz* ŝajnas esti tiuj de *Maul* (1987) en lia volumeto „Vortaj (a)ludoj“. Mi skribis „iom proksimaj“, ĉar tiu ĉi aŭtoro, kvankam li ne evitas la poezion (oni bv. vidi precipe liajn epigramojn) kiel kunteksto de siaj vortludoj, ŝajnas tamen preferi la malpli streĉitan kuntekston de la prozo kaj ankaŭ tiun, eĉ pli liberan, de la listo de humuraj difinoj de vortoj, semantike grupigitaj samloke – mi ĉerpu el lia malgranda volumo nur kelkajn ekzemplojn: **koktela kolekto**, **enhavtabelo** kaj **babela enhavo**, p.4 (109); mi mem ja ne estas **turisto**, ĉar mi loĝas ne en **turo**, p.19 (94), kio eĉ rememorigas *Schwartz*-an vortludon, jam citian; Ne igu **histeria**, restu **historia**, p. 98 (15), speco de leksika „bufrado“, kiun

mi mem renkontis antaŭ jaroj en natura lingvo, la rumana, en la bukureŝta studenta slango de ĉirkaŭ 1965 (rum. *gramatică isterică*, t.e. „histeria gramatiko“ anstataŭ *gramatică istorică*, t.e. „historia gramatiko“).

La laste menciita aŭtoro ekzercas sin ankaŭ en la du- aŭ eĉ trilingva substituado, kiel en la pecoj „Mon(p)opolo“ p.50 (63), kun la angla *made*, germana *Made* kaj esperanta „vermo“; oni devas reskribi la historion de Esperanto, p.90 (23), kun la dulingvaj parodiaj periodaĵo-titoloj **Pariza Maĉo** kaj **Londona Timo** (angle/france kaj esperantlingve). (Samspecaĵo, ĉe *MacGill*, cit.verk., p.5, kie la verda **San Marin’** substituas al la fame konata angla *yellow submarine*).

Koncerne la humurajn difinojn de vortoj ĉe *Maul*, mi citu nur kelkajn el ili: **parlamento** – komuna kriplorado, **sintakso** – memfido (oni bv. revidi la cititan *Schwartz*-an „Eraro de...sin-takso“, **katakomb** – besto flegado (kio rememorigas samspecaĵon en la „Katastrofoj“ de *Marjorie Boulton*), p.5 (108), **insigno** – brustaĵo, p.27 (86), kelkaj el ili eluzantaj eĉ proprajn nomojn: **Hindukuŝo** – ripozo de aziano, **Senegalo** – diskriminacio, p.15 (98), ktp. ktp.

Oni bedaŭrinde havas malpli da okazoj konstati tiajn fenomenojn en la parolata Esperanto, sed ili tute ne mankas ankaŭ tiakuntekste. Estu permesate al mi menci la verbojn **aligatori** kaj **kajmani**, registritaj de mi mem en la parolado de Esperantisto de Aikso-en-Provence (Francio) en 1995, farantajn serion kun la tre bone konata specifa Esperantismo **krokodili** kaj al kiuj oni povus aldoni la ankoraŭ neaŭditan **gaviali**, por rilati variajn gradojn de nacilingva interkomunikado en Esperantista medio.

Simpatian dulingvan substituon, kies kreanto estas atestita (nome la tre bone konata germana interlingvisto d-ro *D. Blanke*) citas *Fiedler* (2001) p.592: Veni, vidi, **vici** – laŭ cezara fama diraĵo, prononcita sin lokigante fine de starvico kaj en kiu la latina *vici* „mi venkis“ (elparolita sendube laŭ germana maniero kaj samtempe laŭ la Esperanta) aludas la esperantlingvan **vicon**.

Fine, pri la senfinaj ebloj de Esperanto por la vortludado, oni vidu ankaŭ la malrektan ekzemplon donitan de *Vitali* (2001) p.334, rilatanta la malambiguigon de la kunmetitaĵo *konkludo*, kiu povas efektiviĝi, uzante la intervortajn paŭzetojn, ĉu per **konklud/o**, ĉu per **konk/lud/o**, kaj – kun la afabla bonvolo de la leganto – la paronimec-

ajn leksika-sintaksajn parojn teorie supozitajn de mi mem (*Dominte*, 2001, p.344: institucia kaj insitut'sia, konsonanço kaj konsonant'so).

Ni ne forgesu la fortostreĉon de *Zamenhof* mem kaj de liaj senperaj posteuloj, eviti kiel eble plej draste la homonimecon por konstrui tre „logikan“ vortaron de Esperanto, kio klarigas la ekziston de vortoj kiel planed/o (anstataŭ plan/et/o), parget/o (anstataŭ park/et/o) cigaredo (anstataŭ cigar/et/o), voĉ/o kaj vok/i ktp.

Finfine tiu fortostreĉo, feliĉe por la destino de la literatura kaj parola lingvo, ne ĉiam, ĉie kaj ĉiurilate sukcese efektiviĝis. Tial, oni havas vortojn kiel **kateto**, **sentema**, **persone** k.a., dumaniere, ambigue kompreneblaj (katet/o kaj kat/eto, sent/em/a kaj sen/tem/a, person/e kaj per/son/e), je la grandaj ĝojo kaj ĝuo de la humurŝatantoj kaj de la literaturistoj, fruktodonaj „eskapitoj“ por la necelita de la iniciatinto luda kapablo de la parolkomuniko.

En Esperanto jam ekzistas relative riĉa humura literaturo kaj multnombraj specifaj anekdotoj farantaj korpuson, kies atenta esploro kondukus sendube al la identigo de la ceteraj – aŭ almenaŭ de iuj el la ceteraj – specoj de substituo.

Mi denove atentigu pri la humura prozverkaro de *Raymond Schwartz* kaj pri lia „gazetista“ agado kiel direktoro de la fama antaŭmilita „La Pirato“, abundaj en altvaloraj specoj de vortludoj, kiaj la menciitaj tipoj. Sed eĉ nur la pli supre menciitaj ekzemploj povas konsistigi sufiĉan pruvon favore al la ideo, jam esprimite supre, ke la planlingvo Esperanto taŭgas elteni la agon de la luda funkciado de la parolkapablo, same kiel ĉiu el „la plej vivantaj“ lingvoj.

Bibliografio

- Bociort I.F.* (1995): *Estetica literară, 2 – Controverse* -, Editura Eurobit, (Timișoara).
- Cazacu B.* (1944) : *Notes de lexicographie et de morphologie roumaines. Bulletin linguistique XII, Copenhague, Bucarest.*
- Dominte C.* (2000) : *Substituția lexicală voluntară în vorbirea neformală. Considerații teoretice generale și de ordin etimologic pentru o lingvistică a vorbirii. „Fonetica și Dialectologie“* (ankoraŭ sub la preso).
- Fiedler S.* (2001): *Die B/blanko Wissenschaft*. Luda komunikado en Esperanto. Studoj pri Interlingvistiko. *Studien zur Interlinguistik*. Festlibro por/*Festschrift für Detlev Blanke*. (red. S.Fiedler/Liu Haitao, Kava-Pech, Dobřichovice (Praha)).

- Graur A.* (1949) : *Deraieri lexicale. Buletin științific. Academia R.P.R. Secția de știință limbii, literatură și artă“ 1, 2, București (reprod. în vol. „Scrieri de ieri și de azi“, București, 1970)*
- Lins U.* (1990): *La danĝera lingvo. Studo pri la persekutoj kontraŭ Esperanto, 2-a eldono, "Progreso", p. 80*
- Hristea Th.* (1968): *Probleme de etimologie. Studii. Articole, Note. București.*
- Jordan I.* (1944) : *Stilistica limbii române. București (ediție definitivă, 1975)*
- Jakobson R.* (1958) : *Linguistics and poetics.* (trad. en la rumanan: *M.Nasta*, en „*Probleme de stilistică. Culegere de articole“*, București, 1964).
- Mounin G.* (1972) : *La linguistique du XX-e siècle. Paris* (trad. en la rumanan: *Constantin Dominte, București, 1999*)
- Nyrop K.* (1913) : *Grammaire historique de la langue française. Tome quatrième, Copenhague.*
- de Saussure F.* (1916) : *Cours de linguistique générale. Paris - Lausanne.*
- Vitali D.* (2001) : *La nazaloj de la Internacia Lingvo. Studoj pri Interlingvistiko. Studien zur Interlinguistik. Festlibro por/*Festschrift für Detlev Blanke*. (red. S.Fiedler/Liu Haitao, Kava-Pech, Dobřichovice (Praha)).*

Dankesprimio

La aŭtoro dankeme mencias la tre afable kolegecan bibliografian apogon flanke de s-ino d-ro *Sabine Fiedler* (Universitato de *Leipzig*) por la kompletigo de tiu ĉi komunikado, prezentita unuaforte en la rumana lingvo okaze de la Simpozio „La akademijaj tagoj de *Timișoara*“, majo 2001 (temas pri la volumetoj de *Stefan McGill* kaj *Stefan Maul*).

Adreso de la aŭtoro

Constantin DOMINTE <dominte@k.ro>
O.P.38 – C.P.86
Sector 2 – București / RUMANIO

Priaŭtoro informo

Lingvisto, docento pri la ĝenerala lingvistiko kaj nuntempa rumana lingvo en la Universitato de Bukureŝto (Rumanio), doktoro de filozofio, eksa sekretario de Kolektivo Esperanto-Interlingvistiko kaj eksa vicprezidanto de la Rumana Esperanto-Asocio. Iama universitata instruisto de Esperanto (Bukureŝto 1977-1983).

Kunaŭtoro kaj kunordiginto – interalie – de dudirekta, duvoluma esperantlingva vortaro por la rumanoj (Bukureŝto, 1980), kunredaktoro kaj tradukisto de la unua volumo de iam projektita balkana literatura antologio, nome Rumana Antologio (*Zagreb*, 1990), redaktoro kaj (kun)tradukisto de la du-lingva, esperanto/rumana eldono de poeziaĵoj el la verkaro de la rumana nacia poeto *Eminescu* en Esperanto (*Timișoara*, 2001).